

Bernard Friot

**Salajrecreto
pri
investkasoĵ, mono
kaj dumviva salajro**

Bernard Friot

**Salajrecreto
pri
investkasoĵ, mono
kaj dumviva salajro**

Monda Asembleo Socia (MAS)

Bernard Friot

Salajrecreto pri investkasoj, mono kaj dumviva salajro

Elfrancigita de Roland Platteau
kontrollegita de Ángel Arquillos López

Monda Asembleo Socia (MAS)

2017

ISBN 978-2-36960-079-4

(= MAS-libro n-ro 174)

Enhavo

Enkonduko de la tradukinto.....	9
Al ekonomio sen kredito nek interezoj.....	12
Etendi la kotizon por ricevi la regadon de la produktado.....	14
Etendi la kotizon al la pleno de la merkata aldonvaloro	15
1. La ekonomiaj kasoj kaj ilia funkciado.....	19
1.1 La principoj fundamentantaj la kreadon kaj funkciadon de la kasoj.....	19
1.2 La funkciado de la kasoj de ekonomia kotizo.	21
1.3 La interkonsiliĝaj kaj kaskontrolaj instancoj	25
1.4 Kio ŝanĝiĝus por la privatuloj kaj la entreprenoj ?.....	27
1.5 Demandoj rilataj kun la sistemo sociigita per la kotizo.....	28
1.5.1 Kiun rolon por la ŝtato? Ĉu por la merkato?.....	28
1.5.2 Kiujn rilatojn kun la « cetera mondo » en malfermita ekonomio ?.....	29
1.5.3 Kio okazus se malsukcesas subvenciita projekto ?.....	30
1.5.4 Ĉu oni irus al « planata ekonomio » ? ..	30
1.5.5 Kiun efikon tiu sistemo havus al la produktivismo kaj pri la ekologiaj demandoj ?	31
1.5.6 Kiel fari por iri de la nuna sistemo al la proponita ?.....	32
1.6 Konkludo.....	34
Enspezi malpli sed vivi pli bone.....	35
2. Konsekvencoj pri la mono kaj ties uzo.....	36
2.1. Naturo kaj uzo de la mono.....	36

2.2. Monkreado: diferencoj kun la nuna sistemo bazita sur kredito.....	38
2.3. Cirkvitigo de la ekonomiaj procezoj.....	41
2.4. Reguligo de la monmaso.....	41
2.4.1 Nuna regulmaniero en hodiaŭa kapitalisma reĝimo?.....	41
2.4.2 Kiu alternativo en kunkotiza reĝimo ?	42
Pri la kontrollegintoj.....	47
La Monda Asembleo Socia (MAS) kaj ĝiaj libroj.....	48

« Mi aprezas tiujn, kiuj
dum maljuniĝo
radikaliĝas.»
(Susan George)

« Oni nenion konstruas sur NE-aĵoj (rezisto, nurdefenda lukto) oni
povas konstrui nur sur JES-aĵoj
(novaj proponoj, batalplanoj).»
(Bernard Friot)

Mi dediĉas tiun traduklaboron al:
B. Traven,
Hugo Chávez,
Muammar Kadhafi,
René Dumont,
Etienne Chouard,
Claude kaj Lydia Bourguignon,
Viviane Forrester,
kaj kompreneble al Bernard Friot.

R.P.

Enkonduko de la tradukinto

De pluraj jardekoj la socialisma pensado ne sufiĉe bazis sin sur atingoj de antaŭaj bataloj, kaj kelkaj maldekstraj partioj eĉ submetis sin al la principoj de la novliberalismo. Nun *Bernard Friot* esploras la reformojn, kiujn en Francujo la registaro de 1945-46 realigis; li malkovrigas ilin al ni sub tutnova lumo. Lumo, kiu ebligas fari el ili la fonton de novspeca socialisma plano, plano demokratia, kaj ne utopia, ĉar ĝi baziĝas sur aferoj, kiuj jam ekzistas, kaj jam funkciis kaj senprobleme funkcias, sed ties klasbatalan kaj revolucionan dimension ni ĝis nun ne sufiĉe vidis. Lia ideo, kiel la ovo de Kristoforo Kolumbo, simplas, sed necesas konsideri, ke nenio – krom la fortrilatoj de la klasbatalo! – malhelpas ilin etendi kaj tiel krei socialisman socion liberigitan el la labormerkato, el la profitiga proprieto, el la ŝuldoj kaj el la bankoj, ne malpli ol tion!

Tiu broŝuro estas la kvara en la serio de broŝuroj eldonitaj de la Salajrecreto. Tial, por starigi la kadron, estus bone legi unue la artikolon laŭ la Esperanta Vikipedio pri la proponoj de *Bernard Friot*:

«**Dumviva salajro** estas propono de la franca ekonomikisto *Bernard Friot*. Liaj ideoj prezentiĝas kiel plua etendiĝo de la klasbatalaj konkretaĵoj entenataj en la reformoj realigitaj en 1944-1946 en Francujo de la registaro (interalie *Ambroise Croizat*) estiĝinta post la liberigo de Francujo fine de la Dua Mondmilito.

Temas pri kreado de ĝenerala reĝimo de sociala sekureco, kiu ebligas pagi la tutan sansektoron, ties investojn, kaj homojn laborantajn en ĝi, la pensiojn de pensiuloj, porinfanan

kromsalajron, ĉion per kotizoj aldonitaj al ĉiu salajro. Tiu uzado de kotizo estas por li fundamenta koncepto, kaj rimedo establi socialismon. Same la plifirmigo kaj etendo de la "Ĝenerala Statuso de la Publikaj Oficoj", kiu garantias al ĉiuj ŝtatfunkciuloj dumvivan salajron, ligitan nek al difinita laborposteno, nek al difinita kvanto de laboro farita, sed al ties persona kvalifiko, agnoskita per konkurso. Tiel la laboristoj ne plu estus submetataj al la potenco, al la hazardoj, al la vundado kaj trudoj de la labormerkato.»

Li proponas etendi tiujn konceptojn, kaj metodojn de financado al ĉiuj laboristoj, kaj fakte ankaŭ al la investoj, kio ebligus ĉesigi ĉiun uzadon de prunto, kaj la bezonon pri (kaj submetiĝo al) ĉiaj bankoj.

Ĉiu homo en la socio ricevas je sia 18-a jariĝo, same kiel li ricevas voĉdonrajton, ankaŭ rajton je kvalifiko, kiu, same kiel al ŝtatoficistoj nuntempe, garantius al li dumvivan salajron (kaj tiel la entreprenoj ne devus pagi lin). Tiu estus financata per plialtigita kvoto de sociala kotizo el la malneta enlanda produkto (MEP). Fakte la tuta MEP estus forprenita en kotizoj, ĉar alia parto de ĝi irus al kaso por investado. Tiel oni kreus en la faktoj socialisman socion.

Laŭ Bernard Friot, tio ne estus utopia¹, ĉar fakte tiuj aferoj jam ekzistas kaj funkcias, temus nur pri etendi la statusojn (la ŝtatoficistoj, la gepatroj kiuj ricevas porinfanan kromsalajron, laboristoj salajrataj kaj sendependaj, kaj entreprenoj, de la sansektoro, kiuj estas malrekte pagataj de la monkompensoj de

1 <https://www.youtube.com/watch?v=hPYYY5aFGwM>

Enkonduko de la tradukinto

sociale sekureco, kaj la pensiuloj, kiuj ricevas senkondiĉe pensiojn ĝis la morto) kaj financrimedojn (kotizoj).

Tio ankaŭ ebligas instali ĝin poiome: kiel ekzemplon li proponas, kiel transiran tujan paŝon: ni atribuas senkondiĉan salajron al la 18-27 jaraĝaj je la unua grado de kvalifiko, po ni diru 1500 eŭroj monate.

Li kreis la asocion «Salajrecreto» kaj abunde prelegas.

La nocion de *dumviva salajro* oni ne konfuzu kun tiu de baza enspezo, kiun li kritikas kiel ian «savrandon de la kapitalismo».

Roland Platteau

Al ekonomio sen kredito nek interezoj

La *Salajrecreto* proponas etendi la principon de kotizo al la tuta ekonomio, komisianta al «salajrokasoj» la disdonon de «dumvivaj salajroj». La alteco de tiuj salajroj difiniĝus laŭ «persona kvalifiko», kiu agnoskas la aktivan kaj respondecan kontribuadon de ĉiu civitano en la ekonomia produktado. La salajra disdonado estus tial plene sociigita, kaj ĉiu estus provizita je «politika statuso de produktisto».

Sed por ke la plena praktikado de tiu nova statuso estu garantiata, nepras demokratiigi la regadon de ĉiuj ĉefaj ekonomiaj leviloj. Tiu ĉi teksto traktas pri la du ĉefaj leviloj, kiuj estas investo kaj mono, kaj esploras kiel povus funkcii la institucioj, kiuj zorgos pri ili. La plej gravaj institucioj estus la «investokasoj», provizataj, same kiel la salajrokasoj, per la kotizomeĥanismo. Ili prezentiĝus kiel alternativoj al la kapitalistaj financaj institucioj. Tiel ili sin liberigus el la meĥanismo de «intereza kredito», kiu hodiaŭ regas la mastrumadon de investado kaj la monkreadon.

Ni decidis, surbaze de la verkoj de *Bertrand Bony* kaj la pensadoj de la grupo «investoj» sine de la *Salajrecreto*, esplori la eblecon konstrui ekonomion sen kredito nek interezo. Ekonomio, kiu ebligus demokratian realproprigon de la mono per nova ekvilibro en la funkciado de la bankaj kaj financaj institucioj.

La proponoj montrotaj en ĉi tiu verko estas unu el la manieroj imagi la financon kaj monan flankon de la principoj eldiritaj en la «politika statuso de la produktisto». Ilia celo estas vigligi

Al ekonomio sen kredito nek interezoj

debaton ĉirkaŭ nekapitalisma perspektivo de la ekonomio, kiu ebligas plenan praktikadon de la uzproprieto de la produktadrimedoj kaj la forigon de la profitodona proprieto.

Porinvestaj kasoj kaj mono

Etendi la kotizon por ricevi la regadon de la produktado

La propono de la Salajrecreto enkonduki dumvivan salajron bazitan sur persona kvalifiko estis disvolvita en broŝuro titolita «Por politika statuso de la produktisto», kiu elŝutablas, en la franca lingvo, de la retejo www.reseau-salariat.info. En la okuloj de la Salajrecreto la dumviva salajro ne povas esti konceptita sen la konkero, fare de la salajrularo, de la **uzproprio de la produktadrimedoj**. Tial la Salajrecreto samtempe proponas financi la investojn sen kredo kaj sen interezoj, danke al la starigo de kaso, kies rolo estus financi la ekonomion, anstataŭ ante la bankojn kaj la akcitenantojn², kaj taskitaj precipe financi la investprojektojn per subvencioj, do sen interezo, sed ankaŭ sen repago.

Tia propono, kiu komence estigas miregon, estas celo de demandoj aŭ objetoj, inter aliaj:

1. «Ĉu do la ŝtato decidus pri ĉio?»
2. «Tio revenigos nin al la centralizita planado.»
3. «Ĉu lokaj intereskonfliktoj kaj la klientismo ne povos superregi super efika kaj racia atribuo de la subvencioj?»
4. «Se la monon kreas la investokaso, kaj se oni subvencias la projektojn, tiam nenio limigos la volumenon de la disdonitaj subvencioj. Laŭplaĉa presado de mono riskos la revenon

2 La terminoj akcitenanto kaj akciulo estas uzataj sinonime. -rp

Etendi la kotizon por ricevi la regadon de la produktado
de inflaciego.»

Etendi la kotizon al la pleno de la merkata aldonvaloro

La Salajrecreto proponas etendi la principon de socialaj kotizoj – kiu ekzemple en Francujo jam funkcias – je proksimume 360 miliardoj da eŭroj jare, t. e. 18 elcentoj de la franca malneta enlanda produkto (MEP), por financi la socialan protekton cele dispartigi la tuton de la ekonomia merkata produktitan ĉiujare (tio estas proksimume 1 300 miliardoj da eŭroj en MEP je proksimume 2 000 miliardoj da eŭroj).

Kompreneble tio kondukus al ia MEP, kies sumo kaj enteno estus tre malsama ol tio, kio ĝi estas nuntempe, kaj tio partoprenas en la celoj de tiu propono. Tamen, por pli bone komprenigi la aferon, ni uzus ĉi tie ties nuntempan strukturon.

En tiu hipotezo la baza disdono de la ekonomia merkata valoro estus la jena: la merkataj entreprenoj konservus 15 elcentojn de la aldonvaloro³ por sia memfinancado. La cetero estus

3 Jen por distingi la vorton *aldonvaloro* en tiu ĉi libro disde la termino *plusvaloro* (kiel la tradukinto kaj la kontrolleginto tradukis la francan *valeur ajoutée*) en la marksisma terminaro, kie ĝi signifas tiun parton el la aldonvaloro (do, el la valoro, kiun la laboristoj aldonas per sia laboro), kiu superas la reproduktadkostojn de la laboristoj (do, en kapitalisma socio: kiu superas la salajron). Tio estas sendependa de la socia ordo, do ĉu en la sklavsocio, en la feŭdismo, en la kapitalismo aŭ en ia ajn formo de socialismo. Tiel, se oni entute agnoskas la validon de la valorleĝo. En la burĝaj ekonomikaj verkoj tamen la vorto *plusvaloro* estas ofte uzata en la senco de aldonvaloro, do de la valoro, kiun la laboristoj aldonas per

Al ekonomio sen kredito nek interezoj

spezita al kotizkasoj: 60 elcentoj al porsalajra kaso, kiu pagus la salajrulojn dumvive surbaze de iliaj personaj kvalifikoj, 25 elcentoj de la aldonvaloro irus al ekonomia kotiza kaso, 10 elcentoj por financi la perajn konsumadojn de la nemerkataj servoj kaj 15 elcentoj estus dediĉitaj al financi investojn pere de subvencioj, tiel igante senutilaj la profitigan proprieton kaj la uzadon de kredito, do samtempe interezojn.

sia produktado. Tiu aldonvaloro kompreneble entenas la reproduktad-kostojn de la laboristoj (en la marksisma terminaro la varian kapitalon, do ĉefe la salajron) kaj la plusvaloron (do, la parton de la aldonvaloro, kiun la kapitalisto ne pagas al la laboristoj). Tiu lasta entenas i.a. la kotizojn de la entrepreno por socia sekureco de la laboristoj, kaj la profiton. -vl

Kotizo? Kio estas tio?

Kiam ni parolas pri kotizoj, ni parolas pri la monfluo elprenita ĉe la produktado (primara disdonado) en la aldonvaloro de la entreprenoj de la merkata sektoro.

Se oni prenas kiel ekzemplon la sektoron pri sano, la tie prenita mono estas disdonata, tra la kasoj de Sociala Sekureco ĉu al la fizikaj fleg-laboristoj ĉu al la establoj (malsanulejoj, ripozhejmoj, ktp) de la prisana sistemo.

La tiel disdonita mono ebligas al tiuj, kiuj ricevas ĝin, akiri varojn kaj servojn de la merkata sektoro, tion ni nomos « **rajto je enspezo** » pri la merkata produktĵaro, tiu egalas, en la kazo de la fleg-laboristoj, al postulo de konsumo, kaj en la kazo de la fleg-establoj al publikaj mendoj por akiri la varojn kaj servojn de pera konsumado, kiuj estas necesaj al la produktado de ties sanservoj. Tiel la kotizo en sia pleno reiras en la merkatan sektoron.

Tiu ĉi teksto celas elpensi konture kiel povus funkcii tiuj kasoj, skizi respondojn al la supraj demandoj kaj objĉetoj, sed ankaŭ konfesi la « nekonataĵojn », kiujn la konkreta historio malkovrus, se tiuj proponoj estus efektivigitaj en la praktiko. Do la demando tute ne estas pretendi, ke ni alportas solvon tutpretan, sed malfermi horizonton, kredeblan, sur kiu oni povas kalkuli, pri liberigo, bazante sin sur tio, kio jam ekzistas kaj efektiviĝis pri kotizado, kiel frukto de la sindikataj kaj politikaj luktoj de la 20-a jarcento.

La sistemo de kasoj pri ekonomia kotizo, kiun proponas la Salajrecreto, apogas sin sur la 70-jara sperto de la kasoj de Sociala Sekureco, kiuj kolektas la kotizojn kaj disdonas la liveradojn. La kotizo egalas proksimume por lando kiel Francujo al 390 miliardoj da eŭroj (18 elcentoj de la MEP), ĝi jam montris, ke ĝi kapablas financi investojn grandskalajn, kiel estis dum la kreado de la Universitataj Malsanulejaj Centroj (france CHU)

en la 1960-aj jaroj, aŭ devige tre longdaŭrajn, kiel estas pri la pensioj (preskaŭ 14 elcentoj de la MEP).

Same la atribuo de subvencioj por financi ĉiajn projektojn jam kutime uzatas de longe de la ŝtato, de la lokaj asembleoj kaj ankaŭ de la Eŭropa Unio.

Etendi tiujn praktikojn do estas celo tute atingebla, sufiĉas ne esti blinda kiel tiuj, kiuj rifuzas vidi ilian liberigan potenciaĵon! Tiel malfermigi la okulojn estas la klopodo de la Salajrecreto.

Ni vidos laŭvice, kiel oni povas elpensi sistemon, per kiu ekonomiaj kotizkaskoj anstataŭus la bankojn por la financado de la ekonomio, poste kiujn konsekvencojn rezultigus tia evoluo por la mono kaj la uzo, kiun ni faras de ĝi. Ĉar, en tia sistemo, la entreprenoj bezonantaj financadon devos direkti sin al kaskoj, ne plu privataj, kiel estas nuntempe la bankoj, sed demokratie mastrumataj de la salajruloj. Oni do devas provi imagi tion, kio povus, kaj kio devus, esti ties funkciado. Aliflanke, ĉar privataj bankoj malaperintus, la kreado kaj uzo de mono estus pro tio forte ŝanĝitaj, ĉar nuntempe la monon kreas bankoj, per sia disdonado de kreditoj. Do necesas ankaŭ en tiu tereno esplori novan vojon.

Etendi la kotizon al la pleno de la merkata aldonvaloro

1. La ekonomiaj kasoj kaj ilia funkciado

1.1 La principoj fundamentantaj la kreadon kaj funkciadon de la kasoj.

La ekonomiaj kasoj estus publikaj establoj rezultantaj de nova konstitucia juro. Ili estus konsekvenco de la enigo en la Konstitucio, samrange kiel la civitanaj rajtoj, de « **politika rajto de la produktistoj** » laŭ kiu la salajruloj estus agnoskitaj kiel kapablaj decidi pri la asigno de la ekonomia valoro, ĉe kio tiu kapablo estas unu el la dimensioj de ilia persona kvalifiko (la alia dimensio estas difini ilin kiel ununuraj produktantoj de la ekonomia valoro). La kasoj estas la efektivigo, tiucele, de la etendigo de kotizo al la financado kaj investo.

La kasoj se sociala protekto: ĉu estas ŝtataj establoj ?

La kasoj pri sociala protekto jam suferis multajn atakojn, ĉar ili estas tiom subfosaj por la superrega ideo de ĉiommerkateco. Tial en Francujo la leĝofaraj dekretoj de 1967 enkondukis en la mastrumadon de la kasoj la « parecon », tio estas, ke ne nur la laboristoj, per siaj sindikatoj, sed egale la mastroj estras ilin, kio kreas la povon de la mastroj fakte, ĉar ili ĉiam trovas kelkajn sindikatojn por voĉdoni kiel ili ! Tiel la laboristoj ne plu mastrumas mem siajn kasojn.

Cetere la ŝtato ĉiam gardis por si la monopolon pri la difino de la kvotoj de mono, kiuj iru al la diversaj kotizoj (krom en la kazo de la monkompenso por sendungeco, UNEDIC), kaj

ĝi kontrolas administre kaj finance la regulojn de funkciado, kaj pli kaj pli intervenas en la buĝeton kaj mastrumadon de la kasoj. La lastaj jardekoj vidis ankaŭ la ŝtaton multobligi la okazojn kie ĝi anstataŭigas la kotizojn per la imposto por financi iun aŭ alian agon de la kasoj.

Krome kaj krone, maldistingo estas lerte flegata en la mensoj de la publiko per la asimilado sub la komuna termino « devigaj elpreno » de samtempe la elspezo de kotizoj, kiu intervenas kiel primara disdivido de la aldonvaloro, kaj la pago de imposto, kies celo estas aposteriora redistribuo.

Tamen tiuj kasoj **ne povas estis asimilataj al la ŝtato**. Ili estas salajraj establoj, iliaj rimedoj plu konsistas principe kaj precipe el socialigita salajro, kaj ilia funkciado fundamentas sur propraj reguloj, deciditaj inter la mastraro kaj la laboristaro.

Pro tio, ke ĝia tasko estas zorgi pri la respekto de la konstituciaj reguloj, la ŝtato devas garantii la ekziston de tiuj kasoj kaj la laŭleĝecon de ilia funkciado, sed ne enmiksiĝu en ilian estradon nek enan funkciadon. En tiu senco la kasoj por investo estus publikaj establoj, sed ne ŝtataj, ĉar esence memstaraj en sia funkciado kaj regataj de propraj reguloj.

La jura celo de la ekonomiaj kasoj estus limigita al investoj kaj monfluoj. Sed ili proponus la tuton de la servoj bezonataj al operacioj de ŝparado kaj financado, egale de la individuoj kiel de la entreprenoj (en ĉi tiu teksto la termino « entrepreno », kiam uzata sole, kompreniĝas en larĝa senco kiel ĉia establo, kiu ajn estas ties jura statuso, kiu produktas ekonomian valoron,

Etendi la kotizon al la pleno de la merkata aldonvaloro

sub formo de varoj kaj servoj ne destinataj al ties nura propra konsumado, ĉu ili estus vendotaj por merkata prezo, ĉu por regulita prezo, ĉu disponigataj senpage laŭ fiksitaj reguloj).

Il devus do partopreni en la demokratia funkciado de la socio, kaj sekve obei la leĝojn kaj regulojn starigitajn de la naciaj kaj lokaj instancoj.

La kasoj estus demokratiaj institucioj taskitaj pri la politika diskutado pri la kreado de ekonomia valoro.

Tiu diskutado temas pri ĉiaj aspektoj de la produktado: ĝiaj celoj, ĝia lokiĝo, la bezonataj substrukturetoj, la kvanto kaj kondiĉoj de produktado, la rezultoj ekonomiaj, mediaj, demografiaj, ktp.

La kasoj de ekonomia kotizo do devus kunigi al siaj interkonsiliĝoj ĉiujn rolantojn, kiuj tuŝas la produktadon: salajruloj, entreprenoj, konsumantoj aŭ uzuloj, lokaj instancoj, asocioj, ktp. Ili ankaŭ devus alŝanĝi sian organizon kaj decidmeĥanismon al la skalo de la financadoj, kiujn ili havas kiel tasko validi, ekzemple laŭ tri niveloj: loka, regiona kaj nacia.

1.2 La funkciado de la kasoj de ekonomia kotizo.

La financaj rimedoj de la kasoj konsistis el la ekonomiaj kotizoj, sur bazo de 25 % de la aldonvaloro de la merkataj entreprenoj. Ili ankaŭ kolektis la ŝparon, same de la personoj kiel de la entreprenoj, kaj la redonon de la redonendaj antaŭpagoj konceditaj al la privatulaj familioj aŭ al la entreprenoj. Tiuj rimedoj devus esti dispartigitaj inter la kasoj

kaj inter la ŝtupoj de la sistemo, ĉu per enaj interkonsiliĝoj, ĉu per elekteraj reguloj originantaj de la publika potenco. Ekzemple tiuj povus postuli dum donita periodo transdonon profite al certaj regionoj cele al reekvilibro de la ekonomia aktiveco sur la nacia teritorio, aŭ por favori la renovigon aŭ kreadon de lokaj substrukturoj, ktp.

Nepre ne maldistingu aldonvaloron kaj ekonomian valoron

Estas nomata *aldonvaloro* la diferenco inter la sumo de vendoj (spezo) kaj la peraj konsumiĝoj⁴. Nur la merkataj entreprenoj, kiuj vendas siajn varojn por merkata prezo do havas proprasencan « aldonvaloron ». Tiu aldonvaloro estas uzata por mezuri la ekonomian valoron produktitan de la merkataj entreprenoj.

Tio ne signifas, ke la produktado de la nemerkataj varoj kaj servoj ne generas ekonomian valoron. Sed tiuj ne estas vendataj sur merkato, kaj do ne generas vendosumon (spezon).

La MEP (Malneta Enlanda Produkto) do havas du kombine-rojn: unu merkatan (pr. 70 %), kies valoro estas la sumo de la aldonvaloro de la merkataj entreprenoj. La duan nemerkatan (pr. 30 % de la MEP), kies valoro estas esprimata en monunuoj per taksado laŭ la kosto de la faktoroj (salajroj + konsumado de fiksa kapitalo), sed kiu ne aperas sub mona

4 Peraj konsumiĝoj (E-a termino kreita de la tradukinto) estas la produktoj kaj servoj, kiuj per la laboro eniras la finprodukton. En la franca: *consommation intermédiaire* aŭ *consommation productive*, la germana: *Vorleistungen* aŭ *produktiver Konsum*. En Esperanto ankaŭ: interaj produktoj kaj servoj.-vl

Etendi la kotizon al la pleno de la merkata aldonvaloro

formo en la momento de sia konsumado, tial ke la varoj kaj servoj ne estas vendataj (aŭ por tarifoj ne ligitaj kun la produktkostoj). Ja do temas pri ekonomia valoro, sed ne merkata, ĉar produktita ekster la dungo kaj la merkataj entreprenoj, kaj neniel ia deprenaĵo, kiu estus farita en jam prduktita valoro en la merkata sektoro. Ebligante ili la rajton akiri varojn el la merkata produktaro, kotizado agnoskas la salajrulojn de la nemerkata sektoro kiel produktistojn, ankaŭ ili, de ekonomia valoro, kiu aldonĝas al tiu de la merkata sektoro.

La servoj disponigitaj de la kasoj rilatus al ĉiaj operacioj rilataj al financado de la ekonomiaj rolantoj. Ili disponigus tri specojn da servoj: **subvenciojn por investo**, por la entreprenoj, redonendaj **antaŭpagoj por konsumado** aŭ por la ordinara funkciado de la privataj familioj aŭ de la merkataj entreprenoj, **buĝetajn resursojn** por la peraj konsumiĝoj de la nemerkata sektoro.

Kiom ajn estas la rimednivelo de la ekonomiaj rolantoj (familioj aŭ entreprenoj), ĉiam okazemas, ke iuj, almenaŭ foje, kapablas ŝpari aŭ bezonas financadon por konsumi pli ol iliaj tuj disponeblaj rimedoj ebligus. La rolantoj en stato de ŝparkapablo povos deponi siajn kromaĵojn al la kaso, igante tiel ilin disponeblaj por aliaj uzoj en la ekonomio.

Kiel distingi inter subvencioj kaj redonendaj antaŭpagoj? Kiam rolanto deziras elspezi pli ol li disponas, oni devas fari distigon laŭ la ekonomia rolo de la petata financado. En la kazo de familia unuo aŭ de merkata entrepreno, kiu deziras

anticipi konsumadon trans siaj antaŭtempaj kapabloj, oni povas doni al ĝi redonendan antaŭpagon, la devigo redoni trudas al ĝi redukti sian postan konsumadon.

En la okazo pri investa elspezo fare de entrepreno, tiu anticipas ontan kreadon de ekonomia valoro, kiu rezultigos por la kasoj plian kolekton da kotizoj, kiu pravigas la donotan subvencion. Ni rimarkigu, ke en la okazo kiam la entrepreno favorata de subvencio estas ne merkata, ĝi uzos tiun subvencion por mendi priinvestajn varojn produktitajn de merkataj entreprenoj, kiuj kotizos sur la realigota aldonvaloro.

La tutaĵa sumo de la liveradoj estus limigitaj dumaniere: unue de la rimedoj de la kasoj, tiomaj, kiom estis difinita ĉi-supre, kaj due pro la aplikado de la mona politiko de la centra banko (vd. pli poste), kiu povus konduki tiun ĉi al instigi la kasojn disdoni pli da spezoj super siaj kolektitaĵoj, aŭ male redukti ilin sub siaj kolektitaĵoj.

Cetere, la kolektita ŝparo kaj/aŭ la redonendaj antaŭpagoj disdonitaj de la kasoj estus aktualigataj per reguligaj kriterioj (- inflacio, + ekonomia kresko), kiu ebligus, ke ĝi estu mone neŭtralaj, cele al konservi iliajn enspezraĵojn sur la ekonomio. Tiu principo certigus al la ekonomiaj rolantoj, ke ili estus nek gajnantoj, nek malgajnantoj en la operacio, kaj malebligus la spekulaciajn manovrojn. Fine ni rimarkigu, ke neniu interezo profite al la kasoj estus necesa, ĉar kompreneble ilia laborantaro estos pagata de la Salajrokaso, kaj iliaj funkciadaj elspezoj per parteto de la kolektita kotizo.

Etendi la kotizon al la pleno de la merkata aldonvaloro

1.3 La interkonsiliĝaj kaj kaskontrolaj instancoj

La politika statuso de la produktisto implicas, tra la persona kvalifiko, la egalecon de ĉiuj en la politika interkonsiliĝo pri la valoro. Tiu egaleco devus efektiviĝi en la estigo kaj funkciado de la interkonsiliĝaj instancoj ene de la kasoj. Tiuj komisionoj (ni nomu ilin tiel) devus cetere kunigi ĉiujn, kiuj ludas rolon en la produktado, kaj samtempe eviti intereskonfliktojn. Tiusence ni povas proponi kelkajn hipotezojn:

Komisiono estu taskita decidi pri la koncedo de resursoj. Ĝi povus konsisti el pluraj grupoj reprezentantaj la rolantajn partojn, kiuj estas:

- La civitanoj reprezentantaj la loĝantaron ĝenerale. Tiu grupo povus posedi la duonon de la seĝoj (kaj do de la voĉoj), konsidere la celon igi la civitanojn posedantoj de la ekonomiaj decidoj.
- La kolektivaj entoj, ekzemple asocioj, sindikatoj, entreprenoj, lokaj komunumoj.
- La establoj de esplorado kaj teĥnika scienco.

Krome povus tie kunsidi – sen voĉdona povo, por protekti la sendependecon de la kasoj, sed tamen kun (reguligita) rajto vetoi la decidojn – reprezentantoj de la lokaj, regionaj aŭ naciaj instancoj, laŭ la skalo de la decidotaj aferoj. Ties rolo estus malhelpi eventualan misuzon de la sumoj ne konforman al la taskoj de la kasoj.

La anoj de la voĉdonantaj grupoj konsistantaj el establoj estus elektitaj de tiuj ĉi.

Por la voĉdonanta grupo reprezentanta la tuton de la loĝantaro, estas necesa doni al ĉiu persono la samajn ŝancojn partopreni. Tial oni povus uzi lotumadon por konsistigi unuan liston. En tiu listo estus konfirmataj nur tiuj, kiuj deklarus plenumi volontule tiun taskon dum limigita periodo (ekzemple 2 jaroj) kaj partopreni en kapabligaj kursoj pretigantaj ilin por tiu ĉi respondeco. Tiuj kursoj devus esti disponigataj de la universitatoj en kadro de aranĝo, kiu certigus la pridiskutecon kaj la publikecon de ties enhavoj kaj la sendependecon de la instruistoj.

Cetere la partopreno en tiuj interkonsiliĝaj komisionoj pri la valoro devus esti konsiderata en la kriterioj de progreso de la persona kvalifiko de tiuj komisiitoj.

La reguloj laŭ kiuj la financadoj estus atribuataj devus esti ĉiujare repridiskutataj, kaj publikigataj. Tiuj reguloj devus cetere konsideri la rekomendojn kaj devigojn, kiuj estus faritaj al ili de la ŝtataj instancoj. Ili estas la efektivigo de la ekonomia, mona, kaj industria politikoj, kiuj estos praktikataj, ne nur je la nomo de la salajruloj, sed je la nomo de la popolo.⁵

Kontrolo, kun eventualaj punoj, farendus pri la funkciado de

5 Neniaokaze oni maldistingu «la salajrulojn» kaj «la popolon». Eĉ se la salajruloj estas la solaj generantoj de la ekonomia valoro, ili ne povas ricevi kiel tiaj la monopolon de la decidoj rilataj al la demokratia organizado de la socio. Rezultas la neceso, ke institucioj, (kiel la ŝtato aŭ la lokaj komunumoj ktp) interagigu por garantii la socian ordon kaj por determini la ĝeneralan kadron ene de kiu oni aranĝu la produktadon de ekonomia valoro kaj ties dispartigon.

Etendi la kotizon al la pleno de la merkata aldonvaloro

la kasoj (kvanto, destino, efikeco, leĝeco kaj laŭreguleco de la agoj, ktp) fare de stablo en la tipo de la Revizora Kortumo.

1.4 Kio ŝanĝiĝus por la privatuloj kaj la entreprenoj ?

La kasoj pri ekonomia kotizo anstataŭus la nuntempajn bankojn (kaj cetero povus dungi la eksajn salajrulojn de tiuj ĉi, kies aktiveco ne estis pri mastrumado de persona riĉaĵo, pri impostparadizoj, kaj aliaj spekuladoj, do pri aktivecoj malaperantaj).

Por la unuopuloj, kio ŝanĝus, estus precipe fondo de ŝparebleco kun reguligata interezo, kiu estus egala al la kreskokvoto pliigita de la inflaciokvoto, sub la formo de nura lokuma rimedo, kia la «libreto A» (en Francujo lokuma rimedo de la ŝparkasoj) sed sen limplafono. Simetrie ili povus akiri redonendajn antaŭpagojn je ekvivalenta interezo. Kompreneble la lokumadoj per financaj biloj malaperus, same kiel ĉia rento el posedaĵo.

Por la entreprenoj, la kasoj pri financado de la ekonomio estus la financaj kunparolontoj por ĉiuj operacioj, ĉu rilataj al la ekspluato ĉu al investado, anstataŭ la nuntempaj bankoj.

Por ricevi financadon, ĉu per redonenda antaŭpago ĉu per investosubvencio, la interprenoj devus ellabori kaj prezenti dosieron en kondiĉoj tute similaj al tio, kion ili devas fari hodiaŭtempe ĉe bankisto, sed kun argumentoj ekonomiaj,

Al ekonomio sen kredito nek interezoj

sociaj, ekologiaj, ktp, anstataŭ argumentoj parolantaj pri financa profitebleco. La entreprenoj povus libere kunfandiĝi aŭ male disfendiĝi, aŭ ĉesigi la aktivecon, kun rezervo en ĉi lasta okazo pri antaŭa determinado de la alĵuĝado de la aktivo al la estontaj rolantoj. Tiuj operacioj ne estus okazo de iu ajn aĉeto nek vendo, ĉar ĉia profitiga proprieto estus malaperinta.

1.5 Demandoj rilataj kun la sistemo sociigita per la kotizo.

1.5.1 Kiun rolon por la ŝtato? Ĉu por la merkato?

Kompreneble indus tiun temon pli amplekse disvolvi.

Por komprenigi la aferojn, ni ĉi tie prezentos nur la kernajn principojn. La Salajrecreto opinias, ke estas precipe grava la pluekzisto de permona ekonomio kaj do de merkata sektoro (ne profitiga, tio estas portanta neniun profiton per poseda rajto) kaj merkataj meĥanismoj, eĉ se la limmarkado de tiuj sektoroj devas estis konstante en debato. La Salajrecreto proponas mlape rigi la labormerkaton kaj la financajn merkatojn, sed ne entute la merkatajn meĥanismojn. La aliro al varoj kaj servoj en merkato pere de monaj interŝanĝoj ebligas al la ekonomiaj roluloj liberecon unuopule arbitracii, elektante tion, kion ili deziras produkti aŭ konsumi, sen alia limigo ol la kvanto de rajtoj je enspezo, kiujn ili akiris per siaj monaj rimedoj.

Rilate la ŝtaton, ĝia rolo estus nur respektigi la institucian kadron kaj la demokratian funkciadon de la kaso. La financado

Etendi la kotizon al la pleno de la merkata aldonvaloro

de ekonomio pere de kotizaj kasoj neniel implicas ian « stiritan ekonomion », aŭ la ŝtatigon de la entreprenoj. Ĉar la profitiga proprieto estos malaperinta, la entreprenoj estos « senpropietaj » en la kutima senco de hodiaŭ, ĉar neniu, eĉ ne la ŝtato, posedus akciojn de ĝi. Ili estus, kontraŭe kaj konstante la uzposedaĵo de la salajruloj, kiuj laborus en ĝi.

1.5.2 Kiujn rilatojn kun la « cetera mondo » en malfermita ekonomio ?

Ni memorigu, ke ni bazas nin sur la *sperto* de pluraj jardekoj de praktikado de la kotizsistemo. La transiĝo do jam komen-
ciĝis, kaj ni proponas nur pluigi kaj plirapidigi jam komencitan
situacion. Kaj tiu situacio ne malhelpis interŝanĝojn kun la
cetera mondo. Do eblas fondi aŭ pli etendi tiun sistemon en
malfermita ekonomio, ĉar ni jam faras tion: ekzemple dum por
la « socie asekuritoj » la akcepto al flegoj estas garantiata de la
asekuro pri malsano, diversaj dispozicioj ekzistas por fakturi la
flegojn al la eksterlandaj kuracatoj ne socie asekurataj en
Francujo, jen per internaciaj intertraktaĵoj, kiu aranĝis al
sindevigo de la devena lando, jen per rekta fakturado. Eĉ se ĝi
estas tre malplimulteca, tiu ekzemplo montras, ke tio, kio estas
senpaga ĉi tie, povas estis pagigita al la cetero de la mondo. La
plietendo ĉi tie de la sfero de la senpageco ne estas kontraŭdira
kun la internacia komerco de tiuj samaj varoj kaj servoj.

La interŝanĝoj pure merkataj plu estus efektivigataj kiel nun
je la « merkata prezo » kun la samaj konsekvencoj aŭ riskoj al

Al ekonomio sen kredito nek interezoj

la komerca ekvibrado.

1.5.3 Kio okazus se malsukcesas subvenciita projekto ?

Inter la aktivecoj aŭ projektoj financitaj per la kotizo, malsukcesoj estas neeviteblaj kaj rezultigus la ĉesigon de la koncerna aktiveco (kaj kompreneble la ĉeson de la financadoj). Sed malsame ol en la nuna situacio la salajritoj plu enspezus siajn salajrojn, kaj do estus frapataj nur de la neeblo konservi sian konkretan laboron. Nenia bezono je « reprenontoj », la aktivoj (maŝinoj, konstruaĵoj, ktp) povus esti disdonataj al entreprenoj kapablaj utiligi ilin denove.

1.5.4 Ĉu oni irus al « planata ekonomio » ?

La esenca modifo kompare kun la nuna situacio estus anstataŭigo de la povo de la akcitenantoj per la decidoj, pere de demokrata debato sine de la kasoj kaj entreprenoj. Tio neniel forigas la iniciatojn « privatajn », en la senco de libero por ĉiu unuopolo krei novan entreprenon aŭ agadon, asociiĝi kun aliaj por tio, ktp, nek la risko esti « sankciita » per manko de mendo por la proponitaj varoj aŭ servoj. Alidirite, la salajruloj kaj la entrepreno devus elteni fiaskon de projekto, sed ne estus kiel nun tiu « duobla puno », kiujn konsistigas la perdo de la sajlaro por la salajruloj, kaj la devigo redoni la ŝuldojn por la entrepreno. Alikonsidere, la – neevitebla – konflikto inter la kasoj kaj la entreprenoj (kiuj parenteze povus direkti sin eventuale al pluraj

Etendi la kotizon al la pleno de la merkata aldonvaloro

kasoj) – la unuaj petantaj financadojn, ke la duaj ne dezirus, aŭ ne kapablus, financi – ankaŭ estus potenca elemento kunordiga kaj reguliga por la produktado.

La proponoj de la Salajrecreto ne implicas la neceson de centra planado. Sed la demando pri planado aŭ pri regulado, ĉu tiu estus ordoneca aŭ instigeca, plu estus tamen starigita, same trafe kiel nun. Eĉ se la meĥanismoj merkataj povas helpi al ioma regulado, nenio certigas, ke ĉiu dezirinda produktado estos plenumita, kaj ke ĉiu produktado neutila, aŭ malutila, estus flankenĵetita memfare, eĉ se la interkonsiliĝo sine de la entreprenoj kaj kasoj povas esti faktoro por memregulado pli bona ol la deziro je profitigo.

1.5.5 Kiun efikon tiu sistemo havus al la produktivismo kaj pri la ekologiaj demandoj ?

La sistemo socialigata per kotizo ne estas mem respondo por tiuj demandoj. Tamen restarigi la precipecon de la politika vidpunkto, kaj estigi la uzproprieton de la produktadrimedoj, forlasi la kutimon mezuri la valoron per la labortempo, forigi la profitigan proprieton, el kiu rezultas akumulado kaj senfina kresko, tion ni konsideras kiel influhavajn faktorojn kaj nepran kondiĉon por rekonsideri la kuradon al produktiveco, sed sen igi malnecesa serĉi plibonigon de la vivkondiĉoj.

La sistemo de socialigado per kotizoj, pro la garantio kaj limigo sub maksimumo de dumviva salajro, anstataŭ instigi al

vetkuro por produkti pli iel ajn por plu havi la laborpostenon, ebligis, male, pripensi formojn de la « bona vivo » aliajn ol konstanta plikreskado de la aĉetpovo. Inkluzive ĉesi produkti varojn kaj servojn neutilajn, malutilajn aŭ tro poluantajn aŭ energivorajn, eĉ se tio kondukus al malaltigo de la nominalaj salajroj (ĝenerale) pro la implica malaltiĝo de la merkata MEP (vd. p.24, la kadron II.1 « Enspezi malpli, sed vivi pli bone ? »)

1.5.6 Kiel fari por iri de la nuna sistemo al la proponita ?

La demando pri la transiro al la nova modelo estas memkompreneble decida demando. Tamen konsidere ke ni apogas nin sur io jam ekzistanta (la sociala kotizo, la dumviva salajro de la ŝtatfunkciuloj kaj emeritoj ktp), kaj jam praktikata de jardekoj, tiu ĉi jam grandparte komenciĝis ! Ni ne estas en pura kapitalismo, la nekapitalisma produktado jam konsistigas 30 % de la MEP (malneta enlanda produkto). La ambicio de la Salajrecreto konsistas en tio: iri pli rapide kaj pli antaŭen, proponante perspektivojn el konkeroj (kaj rekonkeroj), kiuj orientos nin en la direkto de proponoj aŭ de postuloj kondukantaj al malsklavigi la salajrularon el ĉia ĉantaĝo pri dungo kaj ŝuldo.

Se ni supozas, ke vasta movo estiĝos en tiu direkto, neniuj povas diri, kiel la aferoj disvolviĝos, en kiu okazovico, en kiu momento, kun kiuj konsekvencoj, ktp. La maksimumo farebla estas elvoki trabatendajn pensovojojn, kiujn la nuntempa situacio povas igi nin konsideri.

Etendi la kotizon al la pleno de la merkata aldonvaloro

Kiel komenci ? Jam per etendo aŭ plia disvolvado de la ekzistanto, per defendado aŭ plia disvolvado de ĉia paŝo kiu tendence malpliigas la potencon de la financaj merkatoj, de la labormerkatoj, kaj de la kredito.

Jen kelkaj ekzemploj rilataj al la financado de investoj:

- aliformi la « CVAE » (en Francujo loka imposto pagata de la entreprenoj kaj sendependaj laboristoj laŭ la sumo de la estigita *aldonvaloro*, kaj kiu utilas por financi la lokajn komunumojn. Ĝia granda estas proks. 16 miliardoj da eŭroj en unu jaro) por fari ĝin ĝermo de investokotizo, kiu nutros lokan kason pri ekonomia kotizo disponebla por la lokaj etindustrioj, kiuj tiel enirus en sistemon de investokotizo, kaj por la salajrujoj, kiuj dezirus repreni sian entreprenon per ĝia transformado en kooperativon.
- Forigi la maksimuman limon, kiu nun limigas la ŝpar-kasajn libretojn, kaj konfidi ekskluzive ties mastrumadon al tiuj laste menciitaj regionaj kasoj, por havigi financadon de vera publika servo por loĝkonstruado.
- Altigi la kvoton de la kotizo de Sociala Sekureco, por ebligi denove al la malsanulejoj investi sen enŝuldiĝi sin en la financa merkato.
- Fondi investokotizon, kiu estus deviga se oni volas havi aliron al la merkato de ŝtataj mendoj. La entreprenoj enirantaj en la sistemon ekpovos cetere, kompreneble, ricevi el la subvencioj, kiujn tiu kotizo faros eblaj.

- Instigi la entreprenojn eniri en la kotizan sistemon per la dekalkulebleco de tiu kotizo el la bazo de la imposto pri la kompanioj (tiu fakte malaperos en la sistemo proponata de la Salajrecreto, same kiel la imposto pri la personaj enspezoj). Oni povus ankaŭ projekti meĥanisman por malaltigi la ŝuldojn de la entreprenoj, kiuj enirus en tiun sistemon.

1.6 Konkludo

La Salajrecreto ne arogas al si disponigi uzpretan sistemon kun tujaj respondoj al ĉiuj demandoj kaj al ĉiuj bezonoj, des pli ke tia pretendo havus karakteron ordoneman, malan al la ideo mem de demokratio kaj al la historia procezo de la sociaj luktoj.

Tiu ĉi prezento do spegulas certan stadion de la pripensad-procezo kaj estas kontribuo al la konstruo de alternativo, kiu bazus sin sur la ekzistanta sistemo de kotizo rezultanta el la pasintaj luktoj.

Multaj demandoj restas do malfermitaj, precipe tiuj rilatantaj al la instancoj kaj al la demokratiaj procezoj de politika interkonsiliĝo iĝontaj necesaj por anstataŭigi la monopolon de la profitigaj proprietuloj en la decidoj pri produktado.

Multaj eksperimentoj disvolviĝas en diversaj kadroj (societoj, kooperativoj, ktp), ofte iniciatitaj de salajruloj aŭ de eksaj salajruloj firme decidintaj eliri el la kapitalisma dungeco, kiun de tiam ili rifuzas. Ĉiuj tiaj iniciatoj indas estis subtenataj kaj kuraĝigataj

Etendi la kotizon al la pleno de la merkata aldonvaloro

Kaj rilate la reagojn de tiuj, el kiuj konsistas nuntempe la reganta klaso, la nura certaĵo estas, ke ili ne lasos la procezon okazi senbare! Nur la historio povos diri, kio okazos kaj kiel la aferoj disfaldiĝos. Nu, ni almenaŭ devas pluigi la batalon tiucele!

Enspezi malpli sed vivi pli bone

Ni supozu, ke oni decidus igi senpagaj la publikajn transportilojn en la urboj. En tia situacio, multaj laborpostenoj estus neniigitaj: ekzemple ĉiuj dediĉitaj al eldonado kaj kontrolado de biletoj, tiuj dediĉitaj al fabrikado de irejoj kaj de aliaj aparatoj por stampi la biletojn, ktp. Same la ĉeso de tiuj aktivecoj rezultigus la forigon de ĉiuj peraj konsumiĵoj, kiujn ili kaŭzis.

Kompreneble la establoj taskataj pri la publikaj transportoj estus plu devigataj aĉeti varojn al la merkata sektoro, kiel la veturilaĵoj kaj ĉiaj materialoj bezonataj de la instalaĵoj, ktp. Ĉio tio necesigus kompreneble pluan funkciantan subvencion al la entreprenoj pri publikaj transportoj, sed la kvanto de tiu subvencio estus malpliigita laŭ la tiel forigitaj monaj kostoj.

Kun ĉio cetera senŝanĝa, la rezultinta malaltiĝo en merkata aktiveco estigus malaltiĝon de la mona maso cirkulanta pro ĝi, kaj ĝeneralan malaltiĝon de la salajroj, en rilata grandeco.

Kaj tamen oni povas taksi, ke tia ago plibonigus la vivkvaliton de multaj urboloĝantoj.

Kadro 2.1 Enspezi malpli sed vivi pli bone

2. Konsekvencoj pri la mono kaj ties uzo

Ne estus en la taskoj de la investkasoj rekte krei la monon. En la volo neniigi la krediton (kaj des pli krediton konfidatan al privataj bankoj) kiel perilo por la kreado de mono, tiu prerogativo estus la monopolo de establo dediĉita al mastrumi la monan mason, kiun ni plu nomos ĉi tie pro oportuno « Centra Banko ». Sed la kasoj ludus rolon en la monkreado pere de la petoj, kiujn ili farus tiucele al la centra banko.

2.1. Naturo kaj uzo de la mono.

Kun la malapero de la profitiga proprieto kaj de la kredito, malaperus ankaŭ ĉiuj financaj produktoj, derivaĵoj aŭ aliaj, bazitaj sur kredito kaj interezo, tial ĉia riĉeca uzo de la mono, tio estas kun celo koncentri riĉaĵojn kaj profitigajn posedaĵojn, estus senutila, se ne malebla.

En tiuj kondiĉoj, la tuta mona maso ekzistus ĉu kiel fidata mono (moneroj kaj monbiletoj), ĉu kiel nemateria formo, sed plene samvalora al la fidata mono, de konto de tuj rehavigebla mono aŭ de kuranta konto⁶. En tiaj kondiĉoj, la tuta mona maso povas esti konata kaj kontrolata sub formo de kontoj,

6 Do, proksimume la ekvivalento al tio, kion la cetraj bankoj nomas la *M1* kaj kion ili uzas kiel mon-amasigoj.

Etendi la kotizon al la pleno de la merkata aldonvaloro

kiujn havus la kasoj pri ekonomia kotizo, ĉe la centra banko.⁷

La monkreado povas esti farata per altigo de la konto de la kasoj kaj malaperigo de mono per la mala operacio. La monkreado (aŭ -malaperigo) neta, kiu povus estis necesa, dependas de la volumeno de la merkata aktiveco. Se oni antaŭvidas kreskon de la merkata aktiveco, tio necesigas plialtigon de la mona maso. Inverse, se oni antaŭvidas pliampleksiĝon de la senpaga kampo al novaj sektoroj, ekzemple, tio devus rezultigi malpliigon de la mona maso.

7 Por ĉiuj, kiuj opinias, ke la ideo kontraŭbatali la monopolon de monkreado donita al la privataj bankoj estas « strangajo » elpensita de la Salajrecreto, jen interesaj ligiloj <http://www.latribune.fr/economie/international/l-idee-choc-etudiee-en-islande-et-si-on-retrait-aux-banques-la-capacite-de-creer-de-la-monnaie-470824.html>, <http://www.latribune.fr/economie/international/les-suissees-voteront-pour-oter-aux-banques-leur-pouvoir-de-creation-monetaire-539180.html>

2.2. Monkreado: diferencoj kun la nuna sistemo bazita sur kredito.

Estas kutime opiniata, ke la efektivigo de investo estas kondiĉita per la antaŭa destino de la ĝin koncerna mono, kiu tiel antaŭas la kreadon de la onta valoro kiun igos ebla tiu investo. Ni vidu kiel la aferoj disvolviĝas nuntempe, kaj kiun alternativon prezentus la kotizo rilate tiun financadon.

Nuna funkciado ene de kapitalisma reĝimo :

Je la primara nivelo, tio estas dum la produktado fare de la merkataj entreprenoj, la plena merkata valoro estas disdonata en mona formo al la privataj rolantoj : al la familioj sub formo de salajroj (rektaj aŭ malrektaj tra la kotizoj kaj la impostoj pri produktado forprenitaj sur la nivelo de la entreprenoj) aŭ sub formo de dividendoj (pago al la akcitenantoj pro ilia profitiga proprieto), al la entreprenoj en formo de dividendoj (al entreprenoj akcitenantoj de aliaj entreprenoj) aŭ de memfinancado (« amortizo » kaj « saldo de spezkonto ne disdonita »).

Post tiu disdono, plej probable, ke la disponebla mono ne estos tie, kie oni ĝin bezonus por investo. Ne estas envere iu kialo por ke la entreprenoj, kiuj deziras investi, estus aŭtomate enspezintaj (sub la fomo de dividendoj) aŭ konservintaj (sub formo de memfinancado) la bezonatajn sumojn. Por investi, necesas do trovi rolantojn, kiuj havas monajn profitojn ilin ebligantajn fari la bezonatajn antaŭpagojn. Por konvinki ilin fari tiujn antaŭpagojn, necesas promesi al ili interezon kaj dividendojn, ebligantaj al ili pliiĝi sian profitigan bonharon. Donante tiel « siajn » kapitalojn, tiuj « investistoj » iĝos pro tio posedantoj de la aktivoj tiel financitaj kaj konsekvence de la rezultantaj profitoj.

Jen por ekzempligi la punkton :

Etendi la kotizon al la pleno de la merkata aldonvaloro

Entrepreno planas pliigon de sia aldonvaloro, pere de tuja kreo de produkttestablo de cent mil eŭroj. Ĝi kolektas la cent mil eŭrojn per alvoko al la financa merkato, kun altiĝo de la kapitalo. Per la kolektita sumo ĝi tuj aĉetos produktan establon, kiu disponeblos post kelkaj monatoj (la estiĝo de tiu establo kreos do tuj MEP-on de cent mil eŭroj). Ekde tio la investinto, kiu « alportis » la cent mil eŭrojn, estos posedanto de tiu produkta establo kaj, kiel rezulto, de la profitoj estigitaj de la naŭ cent mil eŭroj da novproduktita valoro. Eĉ se tiuj ne estas dekomen- ce verŝataj sub la formo de dividendoj, li estos posedanto de la propraj kapitaloj skribitaj en la bilanco de la entrepreno kaj produktitaj de la salajruloj.

La meĥanismo estus simila, se la entrepreno estus uzinta bankan krediton. La cent mil eŭroj estus tiam pruntedonitaj (eventuale per monkreado) de la banko kaj disponigitaj al la entrepreno. La nova produkttestablo kaj la estontaj profitoj estus tiuokaze iĝintaj la posedo de la nunaj proprietuloj. La redono de la prunto estas elportata de la salajruloj per politiko de « salajra modereco » pravigita de la neceso repagi la ŝuldojn ! (tio estas la meĥanismo uzata en la « LBO » (*Leaveraged Buy-Out*, tio estas aĉetoj kun levil-efiko).

En tiu skemo estis do necese la paraziteca perado de « prun- todonantoj » aŭ kredito kun interezo, por movi al investo la monon jam disdonitan sen speciala direktado inter konsumado kaj investado, aŭ por krei la por ekonomia kresko necesan monon.

Krome nenio garantias sufiĉan volumenon da investoj (oni

ĝenerale konstatas eĉ la malon), ĉar la kvanto de pruntedonitaj sumoj dependas de la grado de profiteblo, kiun povas atendi la pruntedonanto.

Cetere la elekto de la investoj fariĝas tiel la ekskluziva privilegio de la profitigaj pruntedonantoj, tiel senigante la salajrulojn (produktantojn) je ĉia uza proprietorajto pri la produktadrimedoj.

Tio, kion ŝanĝus la skemo bazita sur la kotizo : kun la invest-kotizo : la kvoto de la valoro, kiu estus taksita kiel necesa al la financado de la investo , estus malimplice forprenita tiucele ekde la produktado (primara dispartigo). Tiu antaŭdestinado ne nur igus nenecesa uzi krediton, sed ankaŭ certigus, ke la monkvantoj tiel kolektitaj estu reale dediĉitaj al investoj (escepte se la kaso ne disdonus ilin ... sed kiam temas pri subvencioj, ĉiam estas kandidatoj por profiti el ili !)

Tiu antaŭpreno de la mono aljuĝita al la investoj, ĉirkaŭiranta ĝian disdonon al la profitaj proprietuloj, kiuj fariĝis senutilaj, ebligas transdoni la regadon super la decidoj pri la produktado, al la interkonsiliĝaj instancoj, kiuj decidas pri la disdono de financaj rimedoj kadre de la kaso. La konsideritaj sumoj estus efektive reenŝovataj en la ekonomion, per decido de la produktantoj mem kaj rekte en la entreprenoj, kiuj investas.

Etendi la kotizon al la pleno de la merkata aldonvaloro

2.3. Cirkvitigo de la ekonomiaj procezoj.

Kompreneble la fakto, ke ne estos plu da repago, ne implicas, ke la ekonomia cirkvito ne plu estus finplenumita. Ni reprenu la ekzemplon cititan en paĝo 11. Ekde kiam la nova produktad-establo estos konstruita, tiu nove aldonita valoro de cent mil eŭroj estos la fonto de 15 % da investo-kotizoj, 10 % da funkci-adkotizoj, kaj 6 % da salajraj kotizoj (la 15 % restantaj restos en la entrepreno, kiu reenmetos ilin en la cirkviton kiel memfinancadon de novaj projektoj, aŭ sub la formo de ŝparaĵoj) Kiel sekvo la naŭcent mil eŭroj da novaj varoj kaj servoj konsumotaj suferos la saman dispartigon. Tiel en la fino de la periodo la monrimedoj de la diversaj kasoj estos plialtigataj per unu miliono da eŭroj.

2.4. Reguligo de la monmaso.

Ĉar la uzado de kredito kun interezo malaperus, stariĝas la problemoj, kiel la monmaso estu reguligata. Ĉu tiu ne estus « eksplodonta » pro tio, ke eblus senpage ricevi monon kaj sen redoni ĝin ?

2.4.1 Nuna regulmaniero en hodiaŭa kapitalisma reĝimo?

En la antaŭa reĝimo, la reguligo de la monmaso fariĝas (precipe) per la interezkvotoj. La baza principo estas, ke ju pli la interezoj pagendaj de la pruntoprenantoj estas altaj, des malpli estas kandidatoj por pruntepreni, ĉar la profitebleco de la opera-

cio malaltiĝas. Kaj la inversan efikon oni atendas en la okazo de malaltiĝo de la interezkvotoj.

Kiam la kvotoj altiĝas, la malaltiĝo de la volumeno de la kreditoj donitaj de la bankoj rezultigas malpliigon (aŭ malplian altiĝon) de la monmaso, kaj inverse en okazo de malaltiĝo de la interezkvotoj. La rolantoj, kies tasko estas agi pri la interezkvotoj, estas la Centra Banko (kies prioritata tasko estas laŭ la postuloj de la Eŭropunuigaj traktatoj la stabileco de la prezoj) per sia gvid-interezo, kiu determinas, kiom kostas por la bankoj la kreado de pliaj donitaj kreditoj. Kion ni konstatas ? La ago de la Centra Banko estas tre malrekta, kaj ties efikoj, se ili entute okazas, povas rezulti longtempe post la komenca ago je la kvotoj (pluraj monatoj ĝis unu aŭ du jaroj). De jardekoj kaj eĉ pli depost la krizo en 2008 malaltintereza politiko rezultigas emon al pliigo de la mona maso supera al la ekonomia kresko. Sed oni konstatas tamen nek pliigon de la investado (kiu stagnas je proks. 16 % de la aldonvaloro de la nefinancaj entreprenoj), nek tendencon al inflacio (tio estas: la prezoj de varoj kaj servoj restas stabilaj), escepte ĉe la financaj biloj ! La malmultekostaj kreditoj estas do uzataj por krei monon, uzatan por *spekuli* en la financaj merkatoj, prefere ol por investi. Oni povas do plej dubi pri la efikeco de tia sistemo.

2.4.2 Kiu alternativo en kunkotiza reĝimo ?

En la reĝimo kun kotizo, la regulado per interezkvotoj ne plu eblus, ĉar ili estus malaperintaj. Kiuj rimedoj restus en tiaj kondiĉoj por reguligi de la monan mason ?

Etendi la kotizon al la pleno de la merkata aldonvaloro

Ni diru tion malkaŝe, la sistemo socialigita per la kotizo ne proponas ian ajn aŭtomatan rimedon (eĉ teorie) por reguligi la monmason. Ĉio apogas sin sur la politika interkonsiliĝo, je diversaj niveloj, kiuj plej ofte eniros en konflikton, kaj devos do trovi kompromisojn politike kaj socie konsenteblaj, kaj kiuj havos kiel rezulton, ke ili limigos la riskojn de deflankiĝoj. Per tio ke ĝi refondas la demokratian debaton pri la monaj, ekonomiaj, kaj industriaj politikoj, la reĝimo kun kotizo asertas, ke ĉefe gravas la politikeco, pli ol la laŭdiraj « aŭtomataj stabiligiloj » de la kapitalisma modelo, kies fiasko evidentas.

Se oni konsideras la ne tre bonan efikecon de la nuntempa sistemo, la demando, por esti trafa, devas estis reformulita tiel : « ĉu la sistemo de politikaj interkonsiliĝoj en kunkotiza reĝimo povas estis suspektata, ke ĝi estos malpli efika ol la nuntempa sistemo bazita sur la interezo-kvoto ? »

Ni trarigardu kelkajn ekzemplojn :

Je la nivelo de la entreprenoj: En la nuntempa sistemo, la decidoj investi aŭ ne estas farataj de la akciuloj (kaj de la estraro, kies interesoj estis zorgeme strukturitaj laŭ tiuj de la akciuloj pere de la «premiaj akcioj» (opcioj pri aĉeto de akcioj de la kompanio, kie iu laboras, konsistigantaj specon de premio, sed ne leĝe kalkulata kiel tio, angle : « *stock options* ») kaj aliaj gratifikoj ligataj al la financaj rezultoj de la entrepreno). La determina kriterio ĝenerale malmulte rilatas kun ia aŭ tia industria politiko, kaj ofte reduktiĝas al elekti nur la projektojn, kies profitebleco estas ducifera aŭ proksimiĝas al tio. Eĉ se la interezokvotoj estas malaltaj, tio pezas malmulte en la decidiĝo, ĉar

ilia efiko al la profiteblo estas ĉiaokaze sufiĉe malforta. La salajruloj siaflanke pli bone emas depostuli altigon de la investoj en la espero protekti laborpostenojn kaj salajrojn.

En kunkotiza reĝimo la lokekonomia ligo inter la vendosumo de la entrepreno kaj la salajroj pagataj al la laboristoj estus rompita (ĉar tiuj estus pagataj de la salajrokaso) kaj akcitenantoj ne plu ekzistus, anstataŭigitaj de kaso, kiuj subvencios la investoprojektojn. La diktatoreco de la profiteblo de la investita kapitalo estus for, kvankam justa zorgo pri efikeco ne malaperus. Ĉe la salajruloj, la emo konstante pliigi produktado-kvantojn por konservi siajn laborpostenojn kaj salajrojn ne plu havus tiun pravigon.

Fine, ĉar la akcitenantoj estus malaperintaj, la decidinstanco (la estraro) de la entreprenoj devus konsisti el reprezentantoj de ĉiuj partoprenantoj : salajruloj, klientoj, provizantoj, najbaroj de la fabriko, lokaj komunumoj, laŭ skemo proksima al tiu elpensota por la investkaso. La motivoj de la decidoj estus en la bezonoj kontentigendaj, kaj en la konsekvencoj, pozitivaj aŭ malpozitivaj (aktivadoj profitdonaj por la loka loĝantaro, la kulturo, ktp, aŭ diversaj malutiloj kaj poluoj) de la produktado, kies priatento konjekteble ne tro kondukos al ĝisĉiela produktivismo (probable al la malo).

Je la nivelo de la kaso: La salajrokaso, la funkciado-kaso kaj la investkaso ne havas apriorie kialon esti samopiniaj pri la dispartigo de siaj respektivaj rimedoj. La debato estos pri la tereno de la senpageco kaj plimalplia prioritato donenda al investoj, kio kondiĉos la atendotan kreskon de la merkata sektoro, kaj tial la evoluon de

Etendi la kotizon al la pleno de la merkata aldonvaloro

la monmaso.

La publikaj instancoj: La publikaj instancoj, je ĉiuj ties niveloj, havos la taskon decidi orientiĝojn, ofte eksterekonomiajn, sed kiuj ankaŭ havos konsekvencojn por la produktado, kaj estas dubinde ĉu ili kongruos kun la deziroj de la entreprenoj aŭ de la salajruloj.

La kontrol-establoj kaj -meĥanismoj: Ni parolis pri la neceso, ke estu kontrolestabloj, kaj kontrolmeĥanismoj, kies ofico estus kontroli ĉu la monsumoj estis uzataj por la celoj, kun la rezultoj, kiuj estas deklaritaj, kaj trudi al la kaso la respekton de la atribu-reguloj antaŭe deciditaj kaj proklamitaj.

Konklude, ĉiuj ĉi elementoj farigas tre malprobablaj ĉiajn sistemajn deflankiĝojn de la mona maso, kaj eĉ pli probabla malplian kreskon ol la nuna, se oni konsideras la kvanton de « disponebla mono » senfruktigita en la sfero de la financa spekulado, kiu ne plu havus ekzistokialon.

Ni aldonu, ke timigila efiko de la risko inflacio (ĝis tia grado, ke limigi inflacion estas la prioritata celo de la Eŭropa Centra Banko) estas ligita al la fakto, ke inflacio foruzas ... la profitigajn riĉaĝojn. Sed en reĝimo socialigita de la kotizo la profitigaj riĉaĝoj malaperus, anstataŭataj de la uzhavaĝoj, imunaj je inflacio ! Rezultas, ke inflacio je kelkaj centonoj ne gravus.

Oni do vidas ke, skvankam nenio garantias perfektan regula-

Al ekonomio sen kredito nek interezoj

don de la mona maso (kio cetere maleblas, kiu ajn estus la sistemo), ĉio permesas pensi, ke la salajra sistemo estus pli efika ol agi per la interezkvotoj, kies malprospero montriĝas konstante.

Pri la tradukinto

Roland PLATTEAU [rolá plató]

Pri la kontrollegintoj

Ángel ARQUILLOS LÓPEZ [ánĥel arkíljós lópes] (naskiĝinta la 17-an de decembro 1946) estas hispana esperantisto. Li loĝas en Malago (hisp. *Málaga* [málagá]). Li estas prezidanto de la Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, vicprezidanto de la Hispana Esperanto-Federacio kaj redaktisto de la *AEU-Bulteno* por la Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

Li verkis du librojn de originalaj poemoj en Esperanto titolitaj *Mediterraneaj eroj* kaj *Mediterranej eroj II*. Li ankaŭ verkis poemaron en la hispana, *Al son de mis sonetos*.

(laŭ Vikipedio)

Vilhelmo LUTERMANO estas redaktisto ĉe *Le Monde diplomatique en Esperanto* (<http://eo.mondediplo.com>) kaj aktivas ĉe la *Monda Asembleo Socia* (MAS, <http://mas-eo.org>).

La Monda Asembleo Socia (MAS) kaj ĝiaj libroj

... estas asocio fondita en la jaro 2005 de Esperantistoj kiuj, inspiritaj de la artikoloj de la gazeto *Le Monde diplomatique en Esperanto* (<http://eo.mondediplo.com>) – reta, laŭokaze ankaŭ papera – volas ne nur legi, sed ankaŭ diskuti kaj agi.

Ĝi estas strikte bazdemokratia, trasidebla (por siaj membroj), progresema organizaĵo, kiu funkcias nur pere de retpoŝto kaj Interreto. Ĝi partoprenas en la Mondaj kaj laŭeble regionaj Forumoj kaj referencas en sia statuto por sia agado tekstojn kunigitajn en la ĉi tie listigita libro “*Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj ...*” (n-ro 10 en la sekva librolisto). Aliĝo kaj membreco estas senpagaj.

Ĝia retejo: <http://mas-eo.org> enhavas ĉiujn interesajn informojn pri MAS, kaj krome multajn legindajn artikolojn, tradukitajn aŭ memverkitajn de la membroj.

Ĉiu membro rajtas ne nur publikigi en la retpaĝo de MAS siajn tekstojn, sed ankaŭ publikigi librojn en la eldonejo de MAS, kondiĉe ke li havas aŭ trovas la rimedojn por presado – ĉar aliĝo kaj membreco estas senpagaj, MAS ĝenerale ne disponas pri la rimedoj pagi al verkemuloj la eldonadon de libroj.

Tamen, ĝis nun eldoniĝis jam pluraj libroj – jen en la vico de ilia apero:

<http://mas-eo.org/>

Enpaĝigita de la Monda Asembleo Socia (MAS) en
paperformato 14 · 21,6 cm, kun marĝenoj ĉiuflanke de 2,00 cm,
per LibreOffice 4.4.6.3 kaj litertiparoj Liberation Serif 11 (teksto)
kaj 9 punktoj (piednotoj), sub Linukso Ubuntu 16.04

Presita en Britujo en la jaro 2017